n-ro 65

julio 1999

## Kotizoj

De membroj kiuj vidas sur sia adresetikedo (supre dekstre) la jaron '1998' aŭ pli fruan jaron, la kotizo por 1999 ne estas ricevita. Bonvolu kontroli! Ĉar jam estas meze de 1999, eble tuj pagu por 1999 kaj 2000. Jara kotizo estas 15 aŭ 10 eŭroj, depende de la lando-kategorio. Novaj membroj kiuj nun aliĝas bonvolu pagi kotizon por 18 monatoj, t.e. 22,50 aŭ 15 eŭrojn. Fine de junio 1999 la kurzo estis proksimume: 1 eŭro = 1,05 usona dolaro.

Mia nova retadreso estas: <rotsaert(a)esperanto.be>

Roland Rotsaert, kasisto de IKEF

## Enhavo


Universala Kongreso ........ 3
ATTAC : imposte je financaj profitoj ........ 4
Komercaj petoj kaj proponoj ........ 5
Terminologio ........ 7



**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.


La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Seikô Yamasaki; D-ro Rainer Kurz, S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

Atentu !
Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

IKEF-informoj en Interreto: http://komerco.com/ikef

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj je 6.1999 estas proksimume 1 EUR = 1,05 USD = 1,20 IRK.
Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.
Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

**Perantoj**

*Belgio kaj internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/re-g.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efik-so(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)



**IKEF dum la Universala Kongreso en Berlino**

Dum la UK certe okazos la jara ĝenerala kunveno de IKEF; krome estas planata minimume unu vizito al entrepreno.

Bedaŭrinde, kiam mi finpretigis ĉi tiun numeron, nur la dato de la terminologia konferenco estis konata (vidu je p. 7). Se vi urĝe bezonas informon pri dato de IKEF-aranĝo, bonvolu peti de la prezidanto je <f.j.braun(a)t-online.de>. Dum la kongreso estos en la kongresejo komuna budo IKEF/TAKE. Ankaŭ haveblos informoj en la budo de Flandra Esperanto-Ligo (Monato). rr

**Anoncita aranĝo**

**Anshan, Ĉinio, 6-8 aŭgusto 1999**: 2-a Nordorienta Ĉina Kongreso de Esperanto. Temo: Esperanto kaj kunlaboro trans areoj. Okazos apud Qianshan (Mil Montoj), unu el la plej famaj vidindaĵoj en Ĉinio. Kotizo: 50 aŭ 100 USD, depende de land-okategorio. Sekvos turisma postkongreso. Salutoj bonvenas. Informoj: S-ro Wu Guojang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 LIAONING, telefono/fakso +86-413-7100871.

**Pro la eŭro la bankkostoj malaltiĝu**

Unu el la avantaĝoj de enkonduko de eŭro en la Eŭropa Unio estu ke la bankkostoj por internaciaj pagoj iĝu malpli altaj aŭ eĉ entute forfalu. Kvankam la eŭro nur estos plene uzata ekde la jaro 2002, la Eŭropa Komisiono instigis la bankojn iom post iom adapti siajn tarifojn. Ĉar la Komisiono konstatis ke iuj bankoj ne malaltigis, sed plialtigis siajn tarifojn, ĝi kreis adresojn kie klientojn povas anonci siajn plendojn: fakso +32-2-295.07.50, retadreso <europoint(a)dg15.cec.be>.

**Eŭropa Unio: retpaĝaro por komercistoj**

Eŭropa Unio aldonis al siaj interretpaĝoj eron speciale por malgrandaj komercoj: http://europa.eu.int/business. Ĝi alir-eblas en la 11 oficialaj lingvoj de la EU kaj celas plifacili-

gi la akiron de informoj. Komence estas 4 ĉefaj temoj:
- eblecoj de EU-subvenciado
- teknikaj normoj
- leĝaro pri patentoj, markoj, ktp ('intelekta proprietaĵo')
- publikaj adjudikoj (kun aliro al 'Tender Electronic Daily')

Iom post iom venos pli da temoj: ekonomiaj informoj, gazetara servo, komercaj foiroj, adresaro kun 500.000 entreprenoj, aŭtomata tradukilo, ktp.

**ATTAC**

Mi aktivas en civitana movado, ekestinta en Francio antaŭ malpli ol jaro, kaj jam multnombra, kaj jam internacia. Temas pri ATTAC, asocio por imposto je financaj profitoj kaj por helpo al la civitanoj.

La celoj estas
- provo bremsi la teruran povon de la financa sfero, kiu regas ekonomion kaj eĉ ŝtatojn,
- informi pri ekonomio kaj la funkciado de la mondo,
- enkonduko de impostoj je financaj transakcioj,
- uzo de la kolektota mono por la bono de la homaro,
- pliigo (regajno) de reala povo far la civitanoj de ĉiaj mondopartoj, do pli reala demokratia funkciado de la socioj.

Ne temas pri politika partio, sed pri vasta, ariga movado, en kiu membras jam diversaj asocioj, sindikatoj kaj partioj kun tre diversaj politikaj pozicioj, sed kiuj konsentas pri tiuj celoj. La asocio jam organizis "paralelan Davos", aŭ "kontraŭ-Davos", fine de januaro, pri kiu kelkaj amas-komunikiloj raportis internacie. (Davos estas svisa ferioloko kie ĉiujare kunvenas internaciaj financistoj.)

Mi opinias, ke tiaj celoj povas interesi multajn samideanojn. Do mi ŝatus kontakti tiujn, kiuj jam estas membroj, kaj tiujn, kiuj interesiĝas pri tio, aŭ membras en simila asocio.

ANNE AMBLES
(6 rue Grimau, F-17300 Rochefort, Francio; telefono kaj fakso: 05 46 88 73 97, rete <anne.ambles(a)wanadoo.fr>)

(informo ricevita tra ret-info)



**Radio Havano: Raportoj pri praktika Esperanto-uzo bonvenas!**

Radio Havano Kubo bonvenigas raportojn pri utiligo de Esperanto. Krome ankaŭ informoj pri aŭdebleco estas dankeme akceptataj. Adreso: pf. 6240, Havano, Kubo; fakso 537-338729; rete <rhc(a)radiohc.org>.

Jen la frekvencoj:

| Horo UTC | metroj | kHz | Regiono |
|---|---|---|---|
| 07.00 | 31 | 9820 | Okc. kaj N. Ameriko; Pacifika Azio |
| 15.00 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| 19.30 | 21 | 13715 | Eŭropo kaj Mediteraneo |
| 22.00 | 21 | 13715 | Eŭropo kaj Mediteraneo |
| 23.30 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| | 49 | 6070 | |

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Brazilo**

Klasoj de la angla; tradukado de libroj kaj artikoloj en lingvoj portugala, esperanta, angla. Mario FONSECA (IKEF 242) <mariorfonseca(a)zipmail.com.br>.

**Ĉinio**

Mi havas du pecojn da tapiŝoj (3x5') de antaŭ ĉ. 10 jaroj. Sur unu tapiŝo troviĝas bildo de knabo; sur alia estas knabina bildo. La pecoj estas mane broditaj de ĉina artisto, laŭ la geknabaj fotoj, kiuj estas provizitaj de iu greka peristo farinta komercadon en Ĉinio. Bedaŭrinde la finitaj, altkvalitaj tapiŝoj ne estis donitaj al la peristo, kaj mi konservas ilin ĝis nun. Ĉu vi povus helpi min serĉi ilin? La geknaboj nun estas ĉ. 25jaraj. Okaze, mi ankaŭ volas trovi partneron por komerci per Esperanto. Mi eksportas ĉinajn tapiŝojn, tekstilaĵojn kaj aliajn varojn. Dir. Wang Cheng-zhi, YANTAI-A VERD-STELA ARTA KOMPANIO LIMITITA, 34 Daguan Antaŭ-str., YANTAI, ĈINIO; rete: grenstar(a)public.ytptt.sd.cn; tel. 0086-535-6201088; fakso: 535-6251697 aŭ 535-6218008 (c/o 6201088)

**Germanio**

Ofertoj de Jan DZIURKA (fakso +49-2161-209008, Hofstr. 4, D-41065 MÖNCHENGLADBACH):
- uzataj pres-ofset-maŝinoj 'Heidelberg'
- rimenoj kaj tuboj por industrio laŭ ISO-normoj
- inĝenierado: konstruo de mueliloj kaj diserigiloj, malgrandaj fornoj por kunfandi neferajn metalojn
- mueliloj por viando, produktado de medikamentoj, papero kaj preparo de asfalto kun kaŭĉuko

**Kongo**

FLAM (Fabrikanaj Laboristoj Memstaraj) faras jenajn produktojn: biskviton, konfitaĵon, sukeran trinkaĵon, salan fiŝon, viskion, trinkaĵojn ekstraktitajn el zingibro kaj el avokadujo ('verdan vinon'). Oni serĉas apogantojn kaj kunlaborantojn. S-ro Mbo Nsele Moyame, B.P. 14.518, Kinshasa 1, Rép. Dém. du Congo (antaŭe Zaïre) (IKEF 282).

Mi volonte vendus miajn multnombrajn kolektojn de poŝtmarkoj unuope aŭ amase. Mi posedas bonajn valorojn de la plej kolektataj landoj kiel Germanio, Japanio, Ĉinio, UNO, Usono, Israelo, ktp, kaj kompensus peradon.
Giorgio Bronzetti <bronzett(a)vega.chieti.com>

**Slovakio**



Rimedo kontraŭ grizaj haroj

Scienc-esplora instituto pri biologiaj substancoj en Slovakio sukcese finis trijaran esploron, kies rezulto estas senkolora likvaĵo, kiu dum du-tri semajnoj redonas al la hararo la originan (do la iaman) koloron! Egale ĉu temas pri blondaj, nigraj, viraj aŭ virinaj haroj. La produkto jam pasintjare akiris permeson de sanministerio kaj ateston de la ŝtata atestejo.

La rimedon GRIZULO, kiu enhavas i.a. la preparaĵon "Golden Yacca", oni ĉiutage ŝmiras en la har-radikojn. Post reakiro de la iama koloro oni aplikas la rimedon laŭ la bezono - ekz. foje semajne. La rimedo efikas centprocente, ankoraŭ ne estis trovita harspeco, al kiu ĝi ne efikus!

La produktanto serĉas, pere de Esperanto, ekskluzivajn distribuantojn por la produkto en diversaj landoj. Tre bonaj kondiĉoj. Kontaktu s-ron Stano Marĉek, Zvolenska 15, SK-036 01 Martin, Slovakio, ret-adreso: marcek(a)esperanto.sk (IKEF 258)

**Uzbekistano**

Vakcino preparita de Esperantisto

Mi estas sciencisto-esploristo ellaborinta vakcinon por preventi zoonotikan haŭtan leiŝmaniozon, malsanon de kiu suferas ĉiujare proksimume 2 milionoj da homoj en Azio kaj Afriko. Post unu injekto la nova vakcino (patento N 5300 de la Respubliko Uzbekistano) formas la imunstaton dum 3 monatoj anstataŭ kutimaj 6-12 monatoj. Mi proponas la vakcinon al la internacia merkato. Ĝi povas esti produktota en la lando-mendanto kun la partopreno de la aŭtoro-patentoposedanto aŭ aparte haveblas licenco kaj plena dokumentaro pri la produktado. La aŭtoro bezonas peradon de spertaj entreprenistoj kaj komercistoj, kiuj vendas medikamentojn, vakcinojn kaj aliajn medicinajn varojn. La enspezoj de vakcino estos distribuataj inter ĉiuj partoprenantoj samkiel iros por Esperanto-movado. Interesiĝantoj bonvolu sin turni al mi: D-ro Vladimir SHCHOTKIN, Beruni kuchasi 31-50, UZ- 703050 Samarkand, Uzbekistano. Telefono: + 998 (662) 29 13 01. (Eventuale rete tra ĉina IKEF-peranto Wang)

## Terminologio

UK Berlino

Dum la universala kongreso denove okazos Terminologia Kunveno, gvidata de Petro Chrdle. Temo: Terminologia Laboro: Stato, problemoj, perspektivoj. Prelegoj pri TEC, Lexicon Silvestre kaj fervojista vortaro. Planita dato: ĵaŭdo 5 aŭg., 9-12.30 h.

Termino serĉata

Kiu konas taŭgajn terminojn (esperantajn aŭ alilingvajn) por jena formo de komerco: Distribuanto A, loĝanta en lando X, mendas varojn de produktanto B en lando Y. B sendas la varojn ne al A, sed rekte al la klientoj de A, loĝantaj en diversaj landoj. A sendas fakturojn al la finaj aĉetantoj; siavice B sendas fakturon al A; A pagas al B kaj mem respondecas pri pago de siaj klientoj. Iom similas al transita komerco, sed ne estas la sama. rr

MultiDic: Nova terminaro franca-esperanta sur codoromo



"MultiDic", codoromo por PC kun Vindozo 95 entenas pli ol 50 fakvortarojn francajn-esperantajn kaj esperantajn-francajn: agrikulturo, anatomio, arkitekturo-konstruado, arkeologio, artoj, astronomio, aviado, botaniko, fervojoj, ĉasado, kemio, kuirado, ekonomio, elektro-elektroniko, entomologio, familiaraj vortoj, figuraj vortoj, geografio, geologio, gramatiko, heraldiko, historio, iktiologio (fiŝoj), komputiko, juro, likvaĵoj, literaturo, maro, matematiko, medicino, meteologio, milito, mineralogio, muziko, mitologio, propraj nomoj, ornitologio, iloj-maŝinoj, landoj-loĝantoj-lingvoj, fotografio optiko-kino, antaŭnomoj, profesioj, proverboj-esprimoj, religioj, sportoj-ludoj, tekniko, telekomunikoj, televido-radio, titoloj, vehikloj, vestaĵoj, zoologio.

Franclingva programo kaj esperantaj signaroj, en la codoromo, ebligas la vidigon de la vortaroj kaj serĉadon de esperantaj kaj francaj vortoj. Eblas vidigi ankaŭ siajn proprajn dokumentojn en Esperanto. Prezo : 120 FRF + 10 % por sendkostoj = 132 FRF. Informoj kaj mendoj: Christian Bertin, La Bénairie, Route de Servon, F-35410 CHATEAUGIRON, Francio; rete <christian.bertin(a)lemel.fr>. TTT: www.esp.webprovider.com.

(Ret-Info)

## Ret-adresaroj de IKEF-anoj

S-ro Wang, estrarano kaj ĉina peranto de IKEF, prizorgas kaj regule dissendas liston de retadresoj de la IKEF-membroj. Membroj kiuj havas retadreson kaj ne ricevis la liston, bonvolu kontakti lin (retadreso je p. 2).